

La Nobel-premiitoj : Centa datreveno de la naskiĝo de la Nobel-pacpremiito

Albert Schweizer, 3-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 591, 1975.02.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de la jubileo Albert Schweizer ni prezentas al vi historieton de la Nobel-pacpremiitaro. Vi aŭdas la trian prelegon de tiu serio.

A.- La unua ricevinto de la Nobel-pacpremio estas Henry Dunant, la fondinto de la mond-organizaĵo Ruĝa Kruco.

Cl.- Henry Dunant naskiĝis en Ĝenevo en 1828. Li apartenis al riĉa burĝa familio kalvinista. Dum siaj studjarojn li kunlaboris al la fondado de la Junulara Kristana Unuiĝo **Union chétienne des jeunes gens**. Multaj amikoj el tiu protestanta medio lin helpas, kiam li ekagados favore al la fondo de Ruĝa Kruco.

A.- Kiam li fariĝis dudekkvinjara, Henry Dunant forlasis sian naskiĝurbon por iri spekulacii en Alĝerio profite al la anonima Societo de la Muelejoj de Mons-Djemila. Alfrontante administrajn komplikadojn pro la sinteno de francaj funkciuloj li decidis iri kontakti la imperiestron Napoleono la tria.

Cl.- Sed tiam Napoleono militadis en norda Italio kontraŭ la aŭstroj. Henry Dunant ne hezitis veturi ĝis la batalkampoj por provi kontakti la imperiestron. Li vojaĝis en blanka koloniista vestaĵo per kaleŝo, kies koĉero estis tim-tremanta kamparano. Perdata franca kaporalo fariĝis lia servosoldato.

A.- La 24-an de junio 1859 li troviĝas apud la vilaĝo Solferino. Ĝuste la saman tagon la armeoj de la franca kaj aŭstra imperiestroj renkontiĝos. Dum 14 horoj Henry Dunant troviĝos meze de la konflikto, kies celado estas la konkero de monteĝo, kie staras la malnova turo de Solferino. Varmegas la suno. Kaj subite fulmotondra pluvego inundas la batalejon, kie dum la postaj tagoj oni nombras pli ol 17'000 mortigitojn kaj pli ol 40'000 vunditojn.

Cl.- Forgeante la celon de sia vojaĝo Henry Dunant dediĉos ĉiujn siajn fortojn al la flegado de la vunditoj, kiuj kuŝas sur la batalkampoj. Kaj poste nura ideo lin gvidos : fondi internacian organizaĵon, kies tasko estos la flegado de la milit-viktimoj kaj fina celo la ĉesigo de la militoj mem. En Ĝenevo, Parizo kaj multaj aliaj urboj li nelacigeble kontaktas plej diversajn mediojn. Samtempe li verkas libron : *Un souvenir de Solférino (Rememoro pri Solferino)*, kiun li dissendos en novembro 1862 al pli ol 2'000 adresoj, ne forgeante la ŝtatestrojn, reĝojn, korteganojn kaj ekleziestrojn.

A.- La laboro montriĝas tre efika. La libro devas esti reeldonita. Ĉiuj deziras ĝin aĉeti. Alkuras la publiko, kiam Henry Dunant organizas prelegvojaĝojn. Ĉiuj volas vidi kaj aŭdi la aŭtoron de *Rememoro pri Solferino*.

Cl.- Tiu libro, simile al tiu de la usonanino Beecher-Stowe : *La Kabano de onklo Tom*, profunde vipas la konsciencon de tuta generacio. Recenzistoj admiras la verkistan talenton de Henry Dunant. Ni citu la fratojn Goncourt, kiuj skribis en sia tagĵurnalo la 8-an de junio 1863 : « **Rememoro pri Solferino** [...] *jen io pli bela, milfoje pli bela, ol Homero, ol La Retiriĝo de la dekmiloj, pli bela ol ĉio ! Nur kelkaj paĝoj de Ségur, en La Retiriĝo el*

Ruslando alproksimiĝas al tiu ĉefverko. » Siaflanke Charles Dickens aperigas longajn citaĵojn el *Rememoro pri Solferino* en sia antologio *All the year round*.

A.- En la ĝenevaj medioj, sub la persista influo de Henry Dunant, oni sentas la bezonon tuj ekagi. La bonfara societo **Société d'utilité publique** elektas kvinmembran laborkomitaton. En ĝi Henry Dunant kunsidos apud la svisa generalo Henri Dufour kaj la juristo kaj filantropo Gustave Moynier.

Cl.- Gustave Moynier kaj Henry Dunant estis komplementaj fortoj. Dum Dunant ludis la rolon de motoro en la komitato, Moynier provos jure konkretigi en proponoj la ideojn de lia komitata kolego. La rezulto de tiu kunlaboro estos rapide videbla.

A.- Jam en oktobro 1863 kunsidas en Ĝenevo prepar-konferenco kun delegitoj el 16 landoj. Ĝi ekzamenas kaj aprobas la proponojn de la kvinmembra laborkomitato. Kaj ĝi kunvokas diplomatan konferencon kaj adoptas por la fondota organizaĵo emblemon, kiu estas la inverso de la svisa flago. El tio la nomo **Ruĝa Kruco**.

Cl.- La Svisa Federala Registaro akceptis inviti la antaŭviditan konferencon internacian, kaj estas la 22-an de aŭgusto 1864, kiam la reprezentantoj de 12 registaroj solene akceptas la unuan **Konvencion de Ĝenevo**. Estas epokfara dato en la historio de la internacia juro. Ni troviĝas nur kvin jarojn post la milito de Solferino.

A.- Sed Henry Dunant, dum li batalis favore al la kreo de Ruĝa Kruco, tro forgesis siajn muelejojn en Alĝerio. Li bankrotas. Ruinigita li devas forlasi la urbon Ĝenevo. De nun li estos mizerulo. Tamen siajn fortojn li daŭre oferos al Ruĝa Kruco. Kaj kun la sama verkista talento li skribos alvokojn, kiuj ne restis sen influi la pacistojn.

Cl.- En 1901, kiam li ricevas la Nobel-pacpremion, li estas oldulo rifuĝinta en la maljunulejon Heiden en la kanton Appenzell. En la medioj de Ruĝa Kruco oni emis ignori lian tiaman influon. De nun, dank'al la honorigo de la Nobel-pacpremio, tio ne plu estos ebla.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!